






№ 06
1967

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



B O N D E Z I R O J
=====

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A." KAJ LA REDAKCIO DE "ITALA FERVOJISTO", VARME BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO. KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F." KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

GRAVA ATINGAĴO DE NIA ASOCIO
=====

Nia Prezidanto Prof. Inĝ. Lattanzi kaj nia Asocio ricevis la jenajn oficialajn leterojn:

IL MINISTRO DEI TRASPORTI E DELL'AVIAZIONE CIVILE Roma, 21 nov. 1967
ASS/66/7939

Prof. Ing. Bernardino LATTANZI, Presidente I.F.E.A.

Via Donato Creti, 61

B O L O G N A

Egregio Professore,

in relazione al suo interessamento, per l'uso della lingua esperanto nell'ambito dell'Azienda ferroviaria, la informo che sono state impartite disposizioni perché il testo delle avvertenze generali per l'uso degli orari ufficiale e generale delle F.S. venga tradotto anche nella lingua esperanto.

Con la Società Tipografica Pozzo, che cura la stampa degli orari, si é convenuto che l'inserimento del testo in esperanto abbia luogo con effetto dal 26 maggio 1968, in occasione della prossima stampa dell'orario ufficiale. Cordiali saluti.

O.L. SCALFARO

MINISTERO DEI TRASPORTI E DELL'AVIAZIONE CIVILE

AZIENDA AUTONOMA DELLE FERROVIE DELLO STATO

DIREZIONE GENERALE

Roma, 6 nov. 1967

AG.5.2/19169

OGGETTO: Lingue Esperanto e Spagnola
nell'Orario Ufficiale F.S.-

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI
ESPERANTISTI

Via Donato Creti, 61 BOLOGNA

In relazione a quanto prospettato da codesta Associazione all'on.le Ministro dei Trasporti e dell'Aviazione Civile con lettera n.1609 del 9 settembre 1967, si prega di voler cortesemente fornire a questo Servizio una accurata traduzione in lingua esperanto delle "Avvertenze generali per l'uso dell'Orario" (pag.II dell'Orario Ufficiale F.S.).

Ringraziando anticipatamente, si porgono distinti saluti.

IL DIRETTORE DEL SERVIZIO

Plie nia Samideano D-ro Mario SOLA vicprezidanto de la Esperanto-Grupo en Vercelli, ricevis jenan telegramon:

"Koncerne via interesiĝo mi disponis ke la teksto de la ĝeneralaj avertoj de oficialaj kaj ĝeneralaj horaroj de Ŝtataj Fervojoj estu tradukita ankaŭ en lingvo Esperanto punkto Aldono nova lingvo sekve de interkonsento kun tipografia societo interesita al preso de la horaroj okazos ekde la 26-a de majo 1968-a okaze de venonta presado de horaroj mem. SCALFARO Ministro pri Transportoj kaj Civila Aviado.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
=====

MADRIDO (Hispanujo), 3 - 10 aŭgusto 1968

Enirvizo. La oficialaj instancoj en Hispanujo garantiis al L.K.K., ke enirvizoj estos donitaj sen distingo pri la landoj, el kiuj venas la kongresanoj.

Dua Bulteno. En januaro 1968 ĉiu aliĝinto ricevos la Duan Bultenon, kiu enhavos ĉiujn necesajn informojn koncerne loĝadon, ekskursojn, k.t.p.

Fervoja rabato. Ĉiu aliĝinto ricevos specialan rabatilon, per kiu, oni ĝuos rabaton ĉe la hispana fervojo kaj ĉe preskaŭ ĉiuj trajotaj landoj. Detalaj klarigoj akompanos la rabatilon. LA KONGRESA KONSTANTA SEKRETARIO: Pompilio

20-a JUBILEA KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO - IFEF de la 11-a ĝis la 17-a de majo 1968-a en VARNA (Bulgario)

De la 11-a ĝis la 17-a de majo 1968 en la pitoreska mondkonata ripozloko "Zlatni pjasaci" (Ora sablo) apud urbo Varna ĉe Nigra Maro (Bulgario) okazos la 20-a Jubilea kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto Federacio.

Adreso: XX I.F.E.F. Kongreso - Sofia, Poŝtfako 350 (Bulgario).

Rimarko: La kancelario de L.K.K. koncentriĝas en Sofio, tial nur post la 1-a de majo 1968 oni povos sendi poŝtaĵojn al adreso: XX-IFEF-Kongreso-VARNA.

Bankkonto: N-ro 19/2591 DSK Kolarovski - Sofia (Bulgario)

L.K.K. konsistas el: Prezidanto Georgi DOLAPĈIEV, IFEF-komitato, Vicprezidantoj: Stajko PISAROV kaj Georgi DIMOV, Sekretarioj: inĝ. Georgi ĈERNEV kaj Ljuben DIMITROV, Kasisto: Stefan HRISTOV kaj membroj: Georgi NEJKOV, inĝ. Simeon SIMEONOV, Trifon MAĜAROV, Dimo DIMOV, Petar LILKOV, Veliko FILIPOV, Stojĉo STOJĈEV, Kolju KARAKOLEV, Hrista BOROVA kaj Petar KALĈEV.

Kongreskotizo: ĝis la 31-a de januaro 1968: Kongresano el Okcidento usonaj dolaroj 6, el Oriento sovetaĵ rubloj 9,36. Familiano, Junulo, Pensiulo el Okcidento u.d. 3, el Oriento s.r. 4,68. ĝis la 31-a de marto 1968: Kongresano el Okcidento u.d. 8, el Oriento s.r. 12,48. Familiano, Junulo, Pensiulo el Okcidento u.d. 4, el Oriento s.r. 6,24. Post la 31-a de marto 1968: Kongresano el Okcidento u.d. 10, el Oriento s.r. 15,60. Familiano, Junulo, Pensiulo el Okcidento u.d. 5, el Oriento s.r. 7,80. Simbola aliĝo, minimume: Usonaj Dolaroj 2,50. Sovetaĵ Rubloj 3,90.

Aliĝilojn kaj detalajn informojn bonvolu demandi de L.K.K. al la supredirita adreso kaj de la landaj IFEF-asocioj (sekcioj).

En la kadro de la 20-a Jubilea IFEF-Kongreso okazos du kunvenoj de la Internacia Poŝtista Esperanto-Asocio "I.P.E.A." Poŝtistaj esperantistoj bonvolu aliĝi. Detalojn demandu de Poŝtista Esperanto-Societo "Heroldo". Poŝtenska kutija 25 - Sofia (Bulgario).

Tuj post la 20-a IFEF-Kongreso, de la 19-a ĝis la 21-a de majo 1968, okazos la 37-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, same en Varna. IFEF-kongresanoj estas invitataj resti gastoj de la Kongreso de B.E.A.

UNUA KOMUNA KONGRESO I.K.U.E./K.E.L.I.

LIMBURG/Lahn, Germanujo, 25 julio - 1 aŭgusto 1968-a

32-a Kongreso de I.K.U.E.

21-a Kongreso de K.E.L.I.

Loka Kongresa Komitato: Esperanto-Kongreso, D 625 Limburg/L. Markstr. 27

Banko: Kreissparkasse Limburg, Esperanto-Kongress Nr. 10806

Poŝtĉekkonto de la banko: Frankfurt/M. Nr. 23 14

Kotizoj: Kongresano ĝis la 31-12-67 germanaj markoj 25, edzino, junulo sub

20 jaroj, studentoj ĝis la 31-12-67 g.m. 15. Kongresanoj ĝis la 25-6-68 g.

m. 35, edzino, junulo sub 20 jaroj, studentoj ĝis la 25-6-68 g.m. 25.

Atentu la kongres-bultenojn en ESPERO KATOLIKA aŭ DIA REGNO. Petu aliĝilojn ĉe L.K.K.

LA IV-a INTERNACIA ESPERANTISTA FERIO

17 - 30.IX.1968 - Miedzygòrze - Pollando

De 17 ĝis 30 de septembro 1968 en pitoreska montara ripozloko Miedzygòrze okazos la IV-a Internacia Esperantista Ferio. La ferion organizas Feria Fako de Polaj Sindikatoj kaj Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio.

La programo antaŭvidita estas tre interesa kaj riĉa. Partoprenkotizo estas 19.000 italaj liroj kaj ampleksas la tuttagan manĝadon, tranoktadon en 3, 4 aŭ 5 personaj ĉambroj kaj aliajn programerojn. Por la geedzparoj estas rezervitaj 30 dupersonaj ĉambroj.

La partoprenkotizon oni devas sendi en iu ajn valuto per poŝt- aŭ bankmandato al la poŝtĉekkonto de Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, PKO Wrocław n-ro 8-9-250. Personoj el la landoj el kiuj ne eblas transendi monon povas reguligi la partoprenkotizon surloke en Miedzygòrze tuj post la alveno.

PLANU JAM NUN VIAN PARTOPRENON!

LA 39-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO
MONTECATINI TERME - PASKO 1968
=====

Kiel jam anoncite en Catania dum la pasinta 38-a Nacia Kongreso, la est-raro de la Federacio aprobis, ke per iniciato de la Pistoia Esperanto-Grupo, kun helpo kaj invito de la Provinca Turisma Instanco de Pistoia en kunlaboro kun la Kurac-Entrepreno de Montecatini Terme, dum la Paskaj ferioj de la venonta jaro 1968 okazos en ĉi lasta urbo samtempe:

- IV-a RENKONTIĜO DE EŬROPA ESPERANTISTA JUNULARO
- XXXIX-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO.

La programo estas certe tre alloga por ĉiuj, kiuj jam konas ĉi tiun regionon, kaj des pli multe por tiuj, kiuj ĝin ankoraŭ ne konas kaj kiuj havos tiamaniere la eblecon konatiĝi kun la historio kaj kulturo de la plej fama parto de Italio.

En la programo estas entenataj krom inaŭguro kaj kongres-laboroj:

- ekskursoj al Pistoia, Pescia, Collodi, Abetone, Firenze, Lucca kaj Pisa;
- dancfestoj kaj filmoj; literaturaj konkursoj; prelegoj pri diversaj temoj.

Certaj je via multnombra partopreno, ni jam preparas la plej bonan akcepton por via gastigado, laboroj kaj amuzado kaj fidas je via kunlaboro en la disvastigado de nia invito kaj de nia programo. LA ORGANIZAJ KOMITATOJ

8-a INTERNACIA TURISTA KONCENTRADO DE FERVOJISTOJ
=====

AYWAILLE - REMOUCHAMPS (Belgio) de DIMANĈO la 9-an ĝis SABATO la 15-an de JUNIO 1968-a. FINDATO POR ALIĜILOJ: 15-an de APRILO 1968-a.

Sub la Alta Patronado de "INTERNACIA FEDERACIO DE LA TURISTAJ FERVOJISTAJ ASOCIOJ" kaj kun ĝia kunlaborado.

KOSTO DE PARTOPRENADO: 3.250 BELGAJ FRANKOJ aŭ kontraŭvaloro aŭ 65 usonaj dolaroj, ĉio enkalkulita de la vespermanĝo de dimanĉo la 9-an ĝis la tagmanĝo de sabato la 15-an de Junio 1968: servmono kaj impostoj enkalkulitaj, unu trinkaĵo dum ĉiu manĝo, trinkmonoj, asekuro, vizitoj kaj ekskursoj per aŭtoĉaroj, veturoj per aŭtobusoj, akceptoj, partoprenado al la Granda Ferma Bankedo, vinoj enkalkulitaj.

Rabato por Esperantistaj Fervojistaj Asocioj: 150 Belgaj Frankoj po Partopr. Pagoj per internaciaj poŝtmandatoj: Concentration Touristique Internationale des Cheminots. Secrétariat des S.I.F.A.A. 33, Avenue Blonden-LIEGE (Be.)

ESPERANTAJ MANIFESTACIOJ
=====

PORRETTA TERME (Bologna), la 29-an de oktobro 1967-a.

Dimanĉon la 29-an de oktobro okazis, en la salono de Dopolavoro Ferroviario de Porretta Terme (Bo), la disdono de la diplomoj de la pasintjara kurso kaj la inaŭguro de la novaj kursoj 1-a kaj 2-a gradaj.

Ĉeestis la Prezidanto de F.E.I. D-ro Stoppoloni, la instruistoj Prof. Landucci kaj Casagrande kaj multaj novaj Esperantistoj.

D-ro Stoppoloni, kiu antaŭ kelkaj monatoj salutis itallingve la gekursanojn, nun ĝoje salutis uzante nian Lingvon. Li ege dankis la organizantojn de la kurso kaj de la manifestacio, s-ron Pivari kiu ĉiam puŝis por instigi la aliajn gelernantojn lerni pli volonte, kaj la Prezidanton de "Dopolavoro Ferroviario", s-ron Buscaroli kiu gastigis kaj gastigos la kursojn.

Poste, al 16 gekursanoj, la Prezidanto de F.E.I. disdonis la diplomojn.

La manifestacio finis per tosto ĉe tablo abunde pretigita fare de "Dopolavoro Ferroviario".

BOLOGNA, la 5-an de novembro 1967-a.

La antaŭanoncita Esperanto-manifestacio okazis la 5-an de novembro kaj havis grandan sukceson ĉu pro la ĉeesto de grupo de junaj Parizaj fervojistoj esperantistoj, ĉu pro la multnombra ĉeesto de diplomitoj kaj lernantoj de la venontaj kursoj, kiuj okazos ĉe la grupa sidejo kaj ĉe Dopolavoro Ferroviario.

D-ro Cuppini, Prezidanto de la Bologna Esperanto-Grupo, malfermis la manifestacion prezentante la oficialan prelegantinon, S-inon Gamberini, kiu parolis pri la vivo de Zamenhof, pri la Esperanto-organizaĵoj kaj la neceso aliĝi kaj partopreni al ili flanke de la novaj diplomitoj kaj gekursanoj.

Sekvis S-ro Gimelli kiu esperantlingve prezentis la grupon de la francaj gejunuloj-fervojistoj kaj lia reprezentantino f-ino Liliana Poussard kiu salutis la ĉeestantojn kaj invitis ilin al venonta Jarkunveno de F.F.E.A. (Franca Fervojista Esperanto-Asocio) kiu okazos en Nantes la 25-an kaj 26-an de novembro.

S-ano Gimelli anoncis komencon de la kursoj (unua kaj duagrada) organizitaj de D.L.F. "Dopolavoro Ferroviario" la 21-an de novembro.

Poste okazis la disdono de la diplomoj fare de D-ro Cuppini kaj de fraŭlino Poussard, tiu ĉi lasta al lernantoj de la kursoj por fervojistoj.

Ĉe tablo de restoracio de "D.L.F." la bolognaj fervojistoj-esperantistoj salutis la francajn geamikojn kiuj en la sama tago forlasis nian urbon post kvintaga restado. Post-tagmeze la tradicia balo en la salono "Edera", fermis la Esperanto-tagon.

SANT'ARCANGELO (Forlì), la 12-an de novembro 1967-a.

La 12-an de novembro, en la ĉarma urbeto S.ta Arcangelo, kunvenis tridek gesamideanoj el Bologna, Modena kaj Rimini por ĝui kune, la tradician kokfoiron kaj pasigi kun la lokaj amikoj agrablan tagon.

Tre alloga estis la programo: vizito al la urbo sur kies stratoj estis rostigitaj miloj da kokoj kaj kokinoj kiuj tiel agrable odorigis la aeron ke ni terure nin sentis malsataj. Tagmeze, en karakteriza restoracio, finfine ni povis gustumi la rostigitajn kokojn pro kiuj ni tiel sopiris. Je la fino de la tagmanĝo ni pensis donaci diplomon al plej sperta frandemulo: S-ro Marciano gajnis ĝin ĉar ĉiuj povis atesti lian sperton.

Posttagmeze okazis vizito al tre interesaj grotoj el pra-kristana tempo: tiu ĉi vizito fermis la kunvenon: ĉiuj adiaŭis per plenĝoja: ĝis revido venontjare.

NEKROLOGOJ

Harmen HOEN: La 22-an de aŭgusto mortis en Amsterdam nia fidela pioniro Harmen Hoen, kunfondinto kaj honora membro de I.F.E.F., en la aĝo de 68 jaroj. Grandajestis liaj meritoj por la Fervojista Esperanto Movado. De la fondiĝo de IFEF en 1948 li seninterrompe apartenis al ĝia estraro; dum kvin jaroj kiel redaktoro de "La Internacia Fervojisto". Kun zorgo kaj akurateco li dediĉis sin al la redaktora tasko, en kiu li gajnis la estimon kaj amikecon de vasta aro da legantoj.

Hans JAKOB: La 4-an de oktobro ĉesis ekzisti pioniro de Esperanto Hans Jakob, 76-jara, kaŭze de gangreno kiu sekvis gravan operacion. Jakob esperantistiĝis en 1909, kaj dum longaj jaroj estis unu el la gvidantoj de la Movado, kune kun Hector Hodler kaj Edmond Privat, okupante multajn gravajn postenojn, kiel redaktoro de la revuo kaj de jarlibro. Ĝenerala Sekretario, Estrarano, Direktoro de la Serva Centro. Dum la Unua Mondmilito Jakob gvidis el neŭtrala Svisujo servon per serĉado de civiluloj en la militantaj landoj, kaj en 1936 li fondis la "Esperantista Interhelpo"-n, kiu helpadis la viktimojn de la nazia teroro, ĉefe judojn. Li senlace laboradis pri la kompilado kaj redaktado de enciklopedia verko "Kiu estas kiu en la Esperanto Movado". Lia humaneca laboro, lia senkompromisa dediĉo al Esperanto kaj al U.E.A. karakterizas longan epokon de la Movado.

Maria Luisa FIORE: Forta bato frapis la italan esperantistaron precipe la korojn de la Bolognaj gesamideanoj. La 16-an de novembro, kiel ĝentila floro, abrupte deŝirita de sia trunketo, nia kara samideanino Profesorino Maria Luisa Fiore (31-jaraĝa) forpasis de la tero al la ĉielo kie nun troviĝas inter la anĝeloj kiel ŝi. Ĝentila, inteligenta, laborema, dediĉis tutan sian junan vivon al disvastigo kaj instruado de Esperanto.

Siaj lastaj vortoj estis por nia Movado kiun ŝi konsideris kiel sian tutan mondon. Ŝi estis plurjara membrino de nia Asocio kaj partoprenis ofte al niaj kongresoj.

Ke ili repozu en paco! Sincerajn kondolencojn!

ESPERANTAJ NOVAĴOJ
=====

ESPERANTO LAŬ FAMA ITALA LINGVISTO: TORINO: Laste, famaj italaj kaj eksterlandaj lingvistoj, interesiĝis pri Esperanto konsiderante ĝin kiel la plej taŭgan lingvon internacian. Nun, ankaŭ Leo Pestelli, kiu estas inter la plej elstaraj italaj lingvistoj, skribis sur "La stampa": "...La Internacia Lingvo bone progresis kaj progresas: 23 radiostacioj, inter kiu Radio Roma, dissendas programojn Esperantlingve kaj pli ol cent gazetoj estas eldonitaj por legantoj disaj en okdek nacioj. El ĝi ĉerpas turismo; industrio kaj komerco komencas agi same. Tiu kiu ankoraŭ malpermesas al Esperanto plenan sukceson, estas la konkuro de tiu ĵargono kie miksiĝas franca-angla-amerika lingvoj, kiu pretendas fariĝi, ĝi mem, universala lingvo.""

ĈE ITALA RADIO: "PROPAGAZIONE" DISVASTIGAS ESPERANTON: ROMA: Dimanĉon la 8-an de oktobro je la 15,30 horo en la Tria Programo, estis dissendita radio-dramo de Luciano Codignola kun la titolo "La Propagazione" kiun Itala Radio prezentis ĉe la "Premio Italia" 1967-a. En tiu ĉi dramo kie, oni aŭdis de malproksime, vortojn en la plej diversaj lingvoj de la mondo, oni bonege aŭskultis multnombrajn frazojn Esperantlingve. Tiuj frazojn sekvis klarigo, kie inter alie oni diris: "...Tiu ĉi estas Esperanto. Se vi obeos al mi, tuj vi ĝin lernos. Esperanto estas vera internacia lingvo kreita en 1887-a de Prof. Ludwig Zamenhof, mondfama okulkuracisto. ...!"

ITALAJ "KISOJ"(Ankaŭ el Ĉokolado) EN LA POLA LITERATURO: VARSOVIO: La romantika emo de la poloj estas famkonata, tiel ke ili ŝatas eĉ la reklamojn inspiritajn al romantiko, precipe se ĝi venas el Amo-lando. Tiel, en la literatura paĝo de iu pola ilustrita Esperantista revuo, inter soneto kaj epigramo, ni vidis reproduktaĵon de skatolo de famaj italaj ĉokoladetoj nomitaj "baci"(kisoj) kaj sube la Esperantan tradukon, laŭ poezi-maniero, de ĉiuj difinoj pri "bacio" kiuj troviĝas en la kartetoj kiuj envolas la ĉokoladetojn mem. Fine, bone videbla estas la nomo de la tradukanto W.Tomaszewski. Ho, kiel estas potenca la itala spirito!

MARŜADO DE EKUMENA PENSO: BONN: De la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1968-a la Evangelisches Gemeindehaus (domo de evangelia unuiĝo) el Limburg/Lahn (Germanio) gastigos Ekumenan kunvenon inter Katolikoj kaj Evangeliaj Kristanoj kiuj interkompreniĝos nur pere de Internacia Lingvo Esperanto. Oni antaŭvidas proksimume 400 gepartoprenantojn alvenintajn el diversaj mondpartoj.

PENSOJ DE MAO TSE TUNG ELDONITAJ ANKAŬ EN ESPERANTO: PEKINO: Nova traduko de "Ruĝa libreto", la famkonata evangelio de la ruĝaj gvardioj, estis presita; estas la eldono en Esperanto de "Vortoj de Prezidanto Mao". La libreto 343 paĝa kostas 0.2.0 pundoj kaj oni povas ĝin ricevi el Fremdlingvaj eldonoj de Pekino. Dum la lastaj jaroj 19 verkoj de Mao estis eldonitaj en Esperanto.

FILATELIO PROKSIMIĜAS LA HOMOJN DE ĈIUJ LANDOJ! III-a FILATELISTA KONKURSO DE POLA RADIO, organizita kun la partopreno de la Pola Filatelistista Asocio. Oni devas respondi al tri el subaj ses demandoj:

- 1) Menciu la nomojn (antaŭnomojn) de tri personoj lokitaj en la serioj "Grandaj Poloj", per unu vorto difinante ilian agadon (sciencisto, verkisto, ktp), emisiitaj en la jaroj 1961, 1962, 1963.
- 2) Difinu la ĉefan elementon de la desegno de la du vertikalaj poŝtmarkoj el la serioj dediĉitaj al la polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj, emisiitaj en la jaroj 1961 kaj 1962.
- 3) Menciu tri monumentojn prezentitajn en la serio "Monumentoj de Varsovio", emisiita en 1955 kaj kompletigita en 1956.

- 4) La bildoj de kiuj pentristoj estas reproduktitaj sur la poŝtmarkoj el la serio "Pola pentroarto", emisiita en la jaro 1959.
- 5) Kion prezentas la poŝtmarkoj kun la plej granda nominala valoro en la serioj dediĉitaj al la 5-jaro, 10-jaro kaj 15-jaro de Popola Pollando.
- 6) Menciuj tri urbojn prezentitajn en la serio "Historiaj urboj de Pollando", emisiita en la jaro 1960-1961.

La partoprenantoj de la konkurso, kiuj trafe respondos al tri inter la ses demandoj, partoprenos lotadon de 1000 premioj. Respondojn al la konkurso oni devas sendi al la adreso: POLA RADIO, VARSOVIO, BOX 46, POLLANDO - kun kromnoto: Filatela KONKURSO - ĝis la 15-an de decembro 1967-a.

VIZITOJ DE EKSTERLANDAJ AMIKOJ

- Dum la lastaj monatoj vizitis Bologna-n, eksterlandaj geamikoj:
- Je la fino de septembro venis nia karega amiko Irving SHANKER el New Yorko kune kun la edzino Lenore. Ili restis ĉi tie dum kelkaj tagoj.
 - Meze de oktobro vizitis nin dum du tagoj niaj karaj Svisaj amikoj Sasselli el Arbedo kaj Greutert el Giubiasco, tiu ĉi lasta Ĉefkomitatano de IFEF.
 - La unuajn tagojn de novembro (de la 1-a ĝis la 5-a) estis ĉe ni kvin junaj fervojistoj el Parizo gvidataj de niaj karaj geedzoj Bernier.

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA-ESPERANTO - Casella postale 320 -I-00100-ROMA - JARO 1968-a. La dissendoj okazas de h.21,- ĝis h.21,20 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 30,90; 41,24 kaj 50,08. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al la ĉi subaj temoj: Redakro: Luigi MINNAJA. JANUARO 1968-a - Dimanĉojn: la 7-an: Tra la literaturo; la 14-an: Novaĵoj el Italujo; la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto; la 28-an: Leterkesto. FEBRUARO 1968-a - Dimanĉojn: la 4-an: Collodi, aŭtoro de la infanromano "Pino-kjo", la 11-an: Italaj belartaj urboj: Pistoia; la 18-an: Kiel naskiĝis la "Perseo" de Cellini; la 25-an: Mozaikoj en la baziliko de S.Marko en Venecio. SVISA RADIO BERNA - Studio Onde Corte - CH. 3000 BERNA 16 - Sviszera. Programo de la dissendoj en Esperanto de la 5-a de novembro 1967-a ĝis la 4-a de majo 1968-a. La dissendoj okazas lunde kaj merkrede je h.13,05 kaj ĵaŭde kaj sabate je h.22,50 (M.E.T.). Ondlongoj: Por Eŭropo metroj 31,46; 48,66 kaj 75,28. Por Afriko metroj 13,94; 19,60; 25,25 kaj 31,27. RADIO SOFIA-ESPERANTO-DISAŬDIGOJ - Viale Dragan Zankov, 4 SOFIA (Bulgario). Programo Autuno 1967/Vintro 1968. La dissendoj okazas ĉiudimanĉe de h.21,05 ĝis h.21,30 kaj de h.0,30 ĝis 0,55 (nokta lundo) M.E.T. Ondlongoj: metroj 50,62 (dimanĉe vespere), metroj 49,42 kaj 31,38 (lunde frumatene). POLA RADIO-ESPERANTO REDAKCIO, VARSOVIO, Pollando. De la 17-a de oktobro 1967 Pola Radio disaŭdigas sian programon en Esperanto per iom ŝanĝitaj ondlongoj: metroj 25,09; 25,42; 25,59; 31,50; 41,99; 42,11; 50,25. La nomitaj ondlongoj validas ĝis aprilo 1968-a. La Esperanto programo estas disaŭdigata ĉiutage de h.16,30 ĝis h.17,- laŭ mezeŭropa tempo.

N I R E C E N Z A S

NEDERLANDO-NACIO EN OKCIDENTA EŬROPO - Bele abunde ilustrita 65 paĝa libro. Ĝi prezentas verkojn, historion, artaĵojn kaj sciencojn, industrion kaj komercon, instruadon kaj batalon kontraŭ la maro de laborema popolo kiu konstruas iom post iom sian estontecojn. Eldonita de Nederlanda Ministerio por Eksterlandaj Aferoj. Kostas 3,50 nederlandaj guldenoj (14 steloj). LA GERMANA POPOLO KAJ LA UNUIĜINTAJ NACIOJ - Tiu ĉi 63 paĝa broŝuro temas pri ekstera politiko de Germana Demokratia Respubliko kaj enhavas dokumentojn kaj proponojn de la Ŝtatkonsilantaro koncerne la membrecon de G.D.R. en la O.U.N. ESENCO KAJ AGADO DE LA KONSUMKOOPERATIVOJ EN BULGARIO - Prezentas ekonomian studon rilate la vivon, la evoluon, la rentumon kaj la investon de la kapitaloj de la konsumkooperativoj por konstrui novajn domojn kaj stratojn, aĉeti novajn maŝinojn, por plibonigi la vivon de la laboristoj kaj forigi la vivdiferenco inter urbanoj kaj vilaĝanoj.